**Lanĉo de la libreto *Cheia Limbii Esperanto***

Dum la jara E-renkontiĝo de 2019 oni lanĉis la *Ŝlosilon de Esperanto* en la rumana, ĵus eldonita de EAR en Timişoara, taŭga varbilo por neesperantistoj. La lasta eldono de la rumana ŝlosilo aperis en 1921, tradukita kaj eldonita de Heinrich Fischer-Galaţi. Aurora Bute kaj Mariana Pitar aldonis enkondukon, reviziis la gramatikon kaj forigis la arkaikismojn el la vortaro. Ne mankas, kiel en la fruaj eldonoj, la rakonteto *Kiel mi fariĝis esperantisto* de Heinrich Fischer-Galaţi.

